
# SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc - Roussillon »

72, Avenue Général de Gaulle - **66000 PERPIGNAN** ☎ 34.22.18

JARA ABONO : **10** F C.C.P. 956-28 Montpellier

2-a Kvaronjaro 1981 N° 79



# Nia Federacia Kongreso en Nimo

## 16-an kaj 17-an de majo

En la intertempo de nur kelkaj monatoj la nima grupo -kaj cetere, la tuta federacio - suferis la forpason de du gravaj figuroj : Roger Volpelière kaj Georges Salan. Malgraù tio la nima grupo kuraĝe kaj nun ni povas diri, sukcesplene, aranĝis nian federacian kongreson. Tiu kongreso, ĝuste en Nimo, estis la plej sentebla omaĝo al niaj karmemoraj samideanoj kies kuraĝiga ombro min -kaj certe mi ne estis la sola - envolvis dum la tuta kongreso.

Ĉeesto de la deputito-urbestro,S-ro Emile Jourdan, sabaton je la 16a ; S-ino Mounier,sekretario de la grupo donis la parolvicon al S-ro Llech-Walter, kiu salutis la lemoron de niaj karaj malaperintoj kaj ni kune silente staris dum unu minuto. Poste S-ino Mounier prezentis al ni la novan prezidenton de la grupo, S-ro Jannez, kiu akceptis tiun postenon post la elmondiĝo de D-ro Salan. S-ro Jannez salutis kaj donis la parolvicon al la deputito-urbestro.S-ro Emile Jourdan longe kaj varme esprimis sian aktivan simpation al nia movado. Ne povante resti pli longe interni, li tamen rendevuis nin la morgaùon por honorvino antaù la tagmanĝo esperante, ke tiam estos alvenintaj ĉiuj kongresanoj ! Ja por tiu inaùgura kunveno ni estis pene dudeko kio estas vere mizera por federacia kongreso. Ni ofte cerbumas pri kialoj de ne sufiĉe rapida progresado de nia movado dum en propra letargio de la esperantistoj estas parto de la respondo al tiuj kialoj !

S-ro Llech-Walter parolis pri la preparoj de la jarkongreso de U.F.E., kiu okazos en Perpinjano je Pentekosto.

Ĝis la morgaùa laborkunsido ni prokrastis la pritrakton de la ĉefaj punktoj de la tagordo dum S-ro Morin, juna, tre lerta kaj entuziasma esperantisto levis demandon pri sendo de gratultelegramo al la nova Prezidento, S-ro François Mitterand. Sekvis interdiskuto pri efiko,oportuneco kaj formo (ĉu senpere al li,ĉu kadre kaj nur de la estraro de U.F.E. ?). La decido estis resendita al la morgaùa laborkunsido.

S-ro Laval levis interesan demandon : "Ĉu ni estas pretaj por fronti la aplikon de leĝo permesanta kaj ebliganta la instruon de Esperanto en la lernejoj ?".J. Amouroux opinias ke ne, sed ke ni tamen devas insiste peti, ke la koncerna leĝpropono fariĝu leĝo (la konata teksto jam kadukiĝis pro dissolvo de la Nacia Asembleo) tiom pli, ke la registaro en rilato kun "Franca Esperanto Instituto" povos helpi al formado (ĉu tiel komplika afero se la registaro tion bonvolas ?) de profesiaj instruistoj ankoraù ne esperantistoj sed dezirantaj lerni sufiĉe por ĝin instrui. De la registaro dependos la kontentiga apliko de la leĝo .

Post komuna lunĉo ni rekuniĝis ĉe la salono por distra vespero. Rekordis publiko kio cetere estas pozitiva, kiam ĝi ne estas tute esperantista. Ĝi entuziasme aplaùdis la dulingvan tre altnivelan kontribuon de ĥoro gvidata de S-ro Trigan, kasisto de la nima grupo. Sekvis amuza skeĉo kiun interpretis niaj Beziers-aj samideaninoj Authier kaj Terral. Du interesaj filmoj, tute en esperanto, pri FIAT-aùtomobilo kaj Novzelando finis tiun kulture valoran vesperon.

......./......

Dimanĉon matene komenciĝis la dualaborkunsido...

Pro renovigo de triono de la federacia komitato vakis la posteno de D-ro Salan (mortis la 5-an de februaro), S-ro Deligne, S-ino Volpelière, S-ino Négron , S-ro Ensuque, kiu forlasis Montpellieron kaj loĝas en Parizo, S-ro Raynaud kiu, kvankam elektita ĝis 1982, deziris retiriĝi.
Kun granda plezuro ni fine notis la rekandidatiĝon de F-ino Bony el Montpeliero kaj S-ino Mounier el Nimo. Sekve estas unuanime reelektitaj kaj elektitaj la jenaj kandidatoj : F-ino Bony, S-ro Deligne, S-ino Mounier, S-ino Négron, S-ro Raynaud kaj S-ino Volpelière.
Surbaze de teksto proponita de S-ro Llech-Walter, ni fine unuanime decidis pri senpera sendo al la nova Prezidento de telegramo kies teksto troviĝas post tiu-ĉi protokolo.
La rezultojn de nia voĉdono pri la agado de U.F.E. ni trovos protokolo. Dum la pritrakto de la voĉdoniloj, S-ro Henin raportis pri la efektivigo de la federacia libro-servo jam bone proviziita kaj kontentige vizitata dum kongreso.
Necesas urĝe rekonsideri la ekonomian situacion de "Sudfrancia Stelo" ĉar nuntempe ĝi estas deficita. La situacion analizos la redaktora komisiono de S.F.S. al kiu aldoniĝas la federacia kasistino, S-ino Négron. La kasistino raportos dum la federacia aŭtuna laborkunsido, kiu okazos en Béziers la 11-an de oktobro.
S-ino Volpelière, S-ro Laval kaj Lentaigne pretas korekti la manuskriptojn, S-ro Frus por presado kaj ekspedado kaj S-ro Jannez, prezidanto de la Nima Grupo.
Dum jaroj la grupo de Montpeliero sukcese aranĝis prelegvojaĝon de eksterlandano en sino de la federacio komplemente de la tutlanda prelegvojaĝo ĉiujare aranĝata de U.F.E. D-ino Vierne dezirus, ke la diversaj grupoj de la federacio laŭvice aranĝu tiajn prelegvojaĝojn. Se pluraj personoj konsentas pri la efiko de tiuj propagandvojaĝoj, ŝajne neniu grupo pretas transpreni tian taskon.
Ĉar iom profita estas la financa situacio de la federacio, ni decidis donaci 500,oo F por la fonduso-domo de U.F.E.

La tagordo de la laborkunsido tiele elĉerpiĝis sed multe pli malfrue ol antaŭvidite kaj malprofite al la tempo necesa al nia amiko Lentaigne por unuhora prelego pri "Esperanto en la lernejoj". Kun brakhorloĝo en la mano, en nur kvaronhoro da tempo anstataŭ la programita horo, notinde elegante konsentante pri tiu minimuma tempo, nia amiko majstre (ne troiga estas la vorto) kaj entuziasme informis nin pri siaj personaj spertoj, kiel instruisto, por enkonduko de esperanto en la lernejojn.
Pri tiaj kaj aliaj temoj ni tre bezonus legi Lentaigne en la kolonoj de S.F.S. kaj cetere de aliaj periodaĵoj.

Sufiĉe urĝis la tempo, ĉar atendis nin la deputito-urbestro kaj du urbkonsilianoj pro la jam anoncita honora vino aranĝita de la urbo. Dume okazis interŝanĝo de afablaj paroloj inter la urbestro kaj S-ro Llech-Walter kaj disdono de memorigaj medaloj pri la urbo far la urbestro, kiu mem ricevis el la manoj de S-ro Jannez dediĉitan ekzempleron de la originala libro de D-ro Salan, forpasinta prezidanto de la loka grupo : "La Nuda Vero".

Tiu intima sed oficiale agnoskita ceremonio signis nian rekunigon por komuna manĝo ĉe restoracio kaj vizito ĉe rimarkinda "Domo de Laborkompanoj" (Maison des Compagnons) kiu samtempe finiĝis kun nia federacia kongreso.

Protokolis Jean Amouroux

-!-!-!-!-!-

<u>PARTOPRENU en S.F.S.</u> !

Aperigontajn artikolojn ricevas S-ino MOUNIER , 17 Av. De Lattre de Tassigny, 30 ooo NIMES , antaŭ la fino de : MAJO , AUGUSTO , NOVEMBRO k. FEBRUARO .
<u>Proponita temo</u> : Pri minoritataj lingvoj, laŭ la koncerna debato en la Nacia Kongreso.
Ankaŭ partopreno de Junuloj estus ŝatata § KURAĜU DO !

REZULTO de niaj VOĈDONOJ por la LANDA KONGRESO
en PERPIGNAN

Rajtis voĉdoni : 46 Voĉdonis : 27 Validaj voĉdoniloj : 27

| | | | |
|---|---|---|---|
| Agadraporto : | jes : 27 | ne : 0 | sindeteno : 0 |
| Financa Raporto : | jes : 27 | ne : 0 | sindeteno : 0 |
| Buĝeto 1982 : | jes : 27 | ne : 0 | sindeteno : 0 |

| Komitato : | aproboj | malaproboj |
|---|---|---|
| BONNET Sylvie | 22 | 5 |
| CHICOT Emmanuel | 27 | 0 |
| GUILLAUME Jean | 24 | 3 |
| HENRY Hugues | 18 | 9 |
| LE MAGADURE Frédéric | 25 | 2 |
| LE PUIL Ĵak | 21 | 6 |
| LONGUE EPEE Claude | 18 | 9 |
| LUDWIG Edmond | 14 | 13 |
| MOURNMONT Claude | 20 | 7 |
| TRIOLLE Renée | 27 | 0 |

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Reprezentanto de la Federacio ĉe la landa kongreso en Perpignan :

F-ino TERRAL (Béziers)

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Unuanime aprobita telegramo sendita al la nova Prezidento, S-ro François MITTERAND :

" Connaissant vos sentiments très favorables à l'Esperanto exprimés en particulier par votre lettre à l'Union Française pour l'Esperanto, la Fédération Languedoc-Roussillon, réunie en Congrès, vous adresse ses plus sincères félicitations pour votre élection à la Présidence de la République ".

## VIVO DE LA GRUPOJ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

La nima grupo dankas al ĉiuj samideanoj kaj simpatiantoj, kiuj partoprenis kaj helpis en nia Regiona Kongreso.

Dankas ankaŭ al la nima Urbestro kaj Urbestraranoj, kiuj ĉeestis aŭ senkulpigis sin, kaj kadre de la Dua Jarmilo de NIMO, ofertis honorvinon al la kongresanoj.

La vizito de la "DOMO de la KOMPANOJ",pro la afabla kaj kompetenta gvidato de du Kompanoj, estis interesoplena kaj esperdona ĉar S-anoj Lentaigne kaj Gente ankaŭ sukcesis interesi kaj informi la gvidantojn pri Esperanto ; pli kompletan inforkunvenon proponos la nima grupo al la Estro de tiu Komuneca Domo.

Noto de la Prezidanto : Mi forgesis prezenti al la ĉeestantaro la salutojn kaj la senkulpigojn de S-ro Charles BASSO, Departementa Direktoro de la Edukado. Mi esperas ke nia movado profitos de lia helpo, dank'al la simpatio kaj la kompreneco por mi mem ĉiam atestitaj . (H.J.)

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Bonŝance por ni, kvar vizitantoj spontane venis en Nimon inter la Paska lundo kaj la merkredo 6a de majo. Unue 30-jara Svedo, Bengt NILSSON, deziris renkonti nimanon, kiun li konis en Somalio : tie ili samtempe partoprenis en sia respektiva teamo je Kuraca Helpo al la rifuĝantoj. Bengt restis ĝis la sekvanta merkredo kaj vizitis nian rondon antaŭ esti gastigita de D-ino Vierne, en Montpellier.

Poste, du Brazilanoj el Rio de Janeiro : Roberto Odilon HORTA,16-jara k. Lair Iotti LARA,37-jara, kaj hazarde la saman tagon alia E-isto germana 70-jara, Franz HEIDLER : ili partoprenis en nia merkreda kunveno; diapozitivojn pri Brazilo komentariis la Sudamerikanoj mem .

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

# Vortoj de fraŭlo



La 18-an de majo, en la Federacia Kongreso en NIMO, mirinda estis la vigleco de sepdekjaruloj kiel Prezidanto LLECH-WALTER kaj Preleganto LENTAIGNE. Mi renkontis kun plezuro afablan sinjorinon el Montpeliero, kiu lernis Esperanton en la kadro de "Universitato por Tria-Aĝo", kaj ĝin flue praktikas. Kaj simpatia junulo el Perpinjano diris al mi :"Mi konas junajn homojn kiuj estas mense maljunaj, kaj maljunajn kun juna menso". Prave, tute sendube. Ankaŭ mi en mia juna aĝo konis maljunulojn kun arda batalemo, kiel CART kaj ARCHDEACON, aŭ kun giganta laborkapablo, kiel GROSJEAN-MAUPIN. Kaj se ZAMENHOF kaj LANTI ne estus tro frue forpasintaj (tiaj homoj neniam devus morti) ili verŝajne estus longe plu konservintaj sian junan viglecon.

Sed mi jen elvokis la morton. En la lastaj monatoj ĝi draste falĉis en niaj vicoj. Roger VOLPELIERE, la senlaca mondcivitano, kiu ĉiam staris ĉe la kreneloj de plej noblaj humanecaj aferoj; Georges SALAN, pioniro de la jaroj 20-30, kiu en la suferoj de la hitlera infero lasis neniom el sia entuziasmo, kaj revenis al ni kun tute freŝa laborpotenco : tiuj du neforgeseblaj kunbatalantoj lasis nin, kaj ni dolore sentas ilian perdon .

Nun, kies vico ? Normale (kaj eĉ dezirinde) devas malaperi unue la plej aĝaj. Eĉ se interili iuj konservis junecan aktivecon. Tio estas la natura leĝo. Ĝi signas al ni daŭran, ĉiaman devon : ne fidadi nur al la sperto de veteranoj, kiel ajn efikaj; pensi, ke ili ne estas eterne vivontaj, kaj ĝustatempe, senĉese preparadi la novajn teamojn, kiuj devos siavice preni la torĉon en mano, kaj devas jam nun ekzerciĝi por siaj taskoj.

Felice, en la sekvo de la generacioj, dum baldaŭ cent jaroj, malgraŭ la bedaŭrinda meza maljuneco de la esperantistaro, ĉiam kontentige funkcias tiu necesa anstataŭigado kaj refreŝigado de niaj fortoj. Feliĉe en mia vivofino, mi vidas kuraĝigajn signojn : inter ni ne mankas fervoraj kaj kapablaj mezaĝuloj kaj junuloj, el kiuj kelkaj montras, kun la efika ardo de sia juneco, sperton indan de veteranoj. Ni instigu ilin preni sur sin taskojn kaj respondecojn, kaj ni strebadu por ilia plimultigo. Nia konstanta zorgo estu : Kiel veki intereson de gejunuloj al nia lingvo kaj al nia movado ?

Ni meditu la ekzemplon, kiun prezentis al ni en kelkaj minutoj nia amiko LENTAIGNE. Lia prelegeto meritus esti vaste publikigata, per artikoloj, per pli ampleksa broŝuro, per diskoj aŭ kasedoj. Jen estas la nova vojo : per esperanto-uzado al esperantismo. Saman eksperimentadon en la kadro de la Freinet-movado faris K-do RAYNAUD en sia lernejklaso en Alezo. Laŭ tiu skemo, ni streĉu nian imagpovon por eltrovi diversajn samdirektajn procedojn. Prefere ol teoriumi, ni pruvu la Movadon marŝante .

V A L O

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

<u>Jen alia temo por artikoloj en S.F.S.</u> : Kiel veki intereson de gejunuloj al nia lingvo kaj al nia movado . (Dankon S-ro Valo !)

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Pri kongresa financado, en NIMO : La departementa kaj nima kasoj komune elspezis por filmoj kaj teknikaĵoj, afiŝoj kaj poŝtaĵoj.

Dank'al ioma profito per vendado de surprizkovertoj ni ofertis keksojn al la ĉeestantoj en la distra vespero kaj komunajn manĝojn, sabaton vespera (5) kaj dimanĉon matene (2) al gejunuloj de nia Federacio, kies partopreno multe plezurigis nin.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

<u>Denova Anonco</u> : <u>**KVARA MEDITERANEA SEMAJNO ĈE MARO**</u>

Ĝi okazos en SETE, en feriejo LE LAZARET, de la 15-a ĝis la 20-a de septembro. (D-ino VIERNE, 5,R? Docteur Roux, MONTPELLIER).

1) Aliĝo kaj kursoj : 45 F
2) Laŭ peto, pri loĝado kaj la 3 manĝoj :
   a) <u>Prezoj</u> : 580 F por 1 persono en 1-persona dormĉambro
      455 F " 2 " " 2- " "
      ( + 30 F post la 15-a de majo).
   b) Antaŭmendo ebla ĝis la 1-a de julio.

# La Progresoj de Esperanto

Ĉar mi scias ke kelkaj legantoj de S.F.S. ne legas la revuon de U.E.A. "Esperanto" kaj eĉ la bultenon de U.F.E., mi kredas utila konigi al ili la informojn, kiujn donis en la lastaj monatoj tiuj du revuoj .

Fakte temas pri bonaj novaĵoj, kiuj ŝajnas montri la progresojn de Esperanto en medioj, kiuj ĝis nun tute ne interesiĝis pri nia lingvo, sed kiuj nun troviĝas antaŭ gravaj malfacilaĵoj, kiujn ni de longe antaŭvidis.

1°- En septembro 1980 la Eùropa Parlamento konsentis la konkludojn de la raporto Patterson, rilate la proponon de rezolucio deponita de la belga parlamentano S-ro Coppieters. Post tiu akordiĝo la Parlamento kreis laborgrupon en kiu kunlaboras la Eùropa Esperanto Centro.

La raporto Patterson konkludis, ke Esperanto povas esti interesa solvo al lingvaj problemoj kaj ke tiu lingvo prezentas eblecojn, kiuj pravigas profundan studadon. Post esti informita de la Eùropa Esperanto Centro, la Eùropa Parlamento decidis de si mem enketi pri Esperanto.

2°- La Konferenco por Tutmonda Turismo, kunvokita de la Monda Organizaĵo por Turismo, komence de Oktobro 1980 en Manille konsentis deklaron, kiu eksplicite sin turnas al la internacia lingvo kaj al ĝia rolo en la internacia komunikado.

Partoprenis en tiu Konferenco 107 registaraj delegacioj kaj la reprezentantoj de 91 interŝtataj organizaĵoj (UNO,UNESKO,ktp.).

Jen la deklaro koncerne tion :

" La Konferenco rekomendas, ke klopodoj estu faritaj por pligrandigi turismon kaj tiucele por faciligi kaj helpi la komunikadon inter la turistoj, la loĝantoj de la vizitataj landoj kaj la oficistoj,ĉefe de tiuj, kiuj havas universalajn eblecon kaj celon, kiel Esperanto".

3°- La oficiala ŝtatagentejo "Hsinhua" anoncas, ke Ĉinio intensas proponi Esperanton kiel 6-an oficialan lingvon por U.N.O., tio cele doni egalajn rajtojn al la malgrandaj kaj al la grandaj medioj, kiuj apartenas al la monda organizaĵo.

Dum ĝis nun, Ĉinoj interesiĝis malmulte al Esperanto, ni ekscias, ke pli da mil studentoj lernas ĝin en 14 Universitatoj en Pekin, 22 000 perkoresponda kurso kaj ke la radio de Pekin elsendas trifoje duonhoron ĉiutage en Esperanto.

Ni sciis jam, ke ankaù centoj da instruistoj iranaj lernas ĝin, kaj oni renkontas multajn irananojn en Grezijono.

La tri unuaj novaĵoj aperintaj en kelkaj monatoj estas kuraĝigaj kaj devas instigi nin al pli da agemo. Pro tio la nima grupo skribis al la Prezidanto de la Turisma Oficejo por informi lin pri la Konferenco de Manille, kiel estis petite en la artikolo pri tiu temo.

La Prezidanto de la Turisma Oficejo konas nin de longe kaj de tri jaroj konsentis meti anonceton pri Nimo en la jarlibro de U.E.A.

S-ro Lesage, agregaciata profesoro pri angla linvo kaj ĝenerala sekretario de la "Eùropa Domo", informita pri tiuj diversaj okazintaĵoj, petis de mi artikolon por bulteno de sia Asocio (maldekstre francligve, kaj dekstre esperantlingve). Tiu dulingva artikolo jam aperis kaj 150 al 200 personoj povis tiel informitaj kaj eĉ se ili estas scivolemaj kompari la du lingvojn.


Renée VOLPELIERE

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

HUMORAĴA EVIDENTECO

" Tiu kiu scias nenion, tiu scias tiom el tio kiom tiu kiu ne scias plimulte ! "

Petro DAK



# La Poemo de Rodano

Enkonduko : La legantoj ĝuos ĉi-suban eltiraĵon el la "POEMO de RODANO", verkita de l'poeto FREDERIC MISTRAL (1830-1914), kaj el provenca lingvo tradukita de nia eminenta Nima samideano J. VALO.


Oni rimarku ke la versoj estas egallongaj kaj senrimaj samekiel en la provenca originalo.

Plezure oni sciu, ke la traduko estas nun preta kaj eĉ trovis eldonisto, kiu prizorgos ĝian aperigon.

NOSTALGIO PRI PORPASINTA EPOKO

Ho avotemp' de antikva simpleco ,
Kiam la domoj ne havis seruron ,
Kaj en Kundri'kiel ĉie, la homoj
Piketis sin pro ŝerco sub la lampo !
Tiam ĉe ni regis la farandolo ,
Nacia danc' de tuta Rodanio
Kaj de l'antikva reĝland' Bozonida ;
De Kundri' ĝis Arlez' en festotagoj ,
Imite al turniĝoj de l'rivero ,
Ĝi ondas kaj serpentas ĉe la bordoj .
Kaj tie floris la nobla turniro ,
En kiu dum somero, sur Rodano ,
Ĉiudimanĉe, en trupoj rivalaj ,
Luktis la riveranoj kun la ŝildo
Ĉe brusto, lanco en pugno, piedoj
Sur l'alta ŝtupetaro; kaj la knaboj
Sin montris nudaj, fortaj kaj kuraĝaj
Al la okuloj de l'belaj knabinoj .

Ho avotemp' , gaja temp' de simpleco ,
Kiam Rodano portis vivokirlo !
Ni knaboj sur l'akvo longa rigardis
la Kundrianojn, kun man' sur stirilo ,
Pasi fieraj; Rodan', dank'al ili ,
Estis abelej' zuma kaj labora .
Nun ĉio estas morta, vasta, muta ,
Kaj ve ! de tiu movado nur restas
la sulko sola kaj la ronĝospuro
Fosita de la kabloj en la ŝtonoj :
Frotaĵo ja, jen ĉio atestanta
Pri navigad' kun motkri' : Imperien !
Sed la trapas' de la triumfaj ĉaroj
Sur la romiaj vojoj ankaŭ lasis
Ne pli profundajn spurojn kaj havaĵojn .



Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon
**Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES**
Dépot Légal : 2ème Trimestre 1981
Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes